

La Muzeo “Broeker Veiling”

Museumweg 2, 1721 BM Broek op Langedijk
Poŝtfako 1, 1720 AA Broek op Langedijk
Telefona. 0226-313807 / Fakso 0226-318304

Bonvenon en la plej malnova legoma—ŝippaseja—aŭkcio en la mondo.

Vi sidas ĉi tie kiel komercisto, do post nelonge dum la aŭkciado, vi mem povos fiksi la aĉetprezon kiun vi volas pagi por speciala produkto. Tiu ĉi aŭkcio vendas ‘aljuĝe’.

Antaŭ pli ol cent jaroj, en la jaro 1887, ĉi tie en Broek op Langedijk ekestis la unua ‘aljuĝa’ vendado. Pli frue oni vendis voĉe.

La vendisto nomis la vendotakson kaj malaltigis paŝo post paŝo la prezon, ĝis unu el la aĉetantoj kriis: ‘mejn’ (t.e. mia). En tiu maniero ekzemple la brasiko estis vendotaksita je 12 cendoj kaj malplialtiĝis al 11,5 cendoj, 11 cendoj, 10,5 cendoj, ĝis unu el la aĉetantoj kriis ‘mejn’ samtempe ĉe la prezo kiun li volis pagi por la brasiko.

En la jaro 1903 oni instalas la aŭkciprezmontrilon kiun vi vidas antaŭ vi. La prezoj sur la ciferplato sin sekvas de alta ĝis malalta nivelo. Premante la butonon, antaŭ vi en la benko, haltos la montrilo sur la ciferplato. Tiel vi fiksas kiel komercisto la prezon. Samtempe maldekstre de la montrilo eklumos la numero de tiu, kiu premis la butonon. Tiumaniere oni vidas en unu rigardo, kiu estas la komercisto kaj kiun prezon li devos pagi (po kilogramo).

Kiam la boato veturas en la aŭkciojn, vi povas legi sur la boato, sur la malantaŭa flanko, la nomon de la hortikulturisto kiu vendos sian produkton. Tiu ekzemple ofertas 65 kilogramojn da cepoj. La aŭkciisto kondukas la montrilon al la vendotakso de (ekzemple) 80 eŭrocendoj, poste la montrilo malplialtiĝas al 70, 60, k.t.p. La montrilo haltas en la momento kiam vi (komercisto) opinias ke tiu estas bona prezo kiun vi volas pagi. Estas grave premi la butonon en la ĝusta momento. Kiam vi senintence premas pli frue je unu eŭrocendon, vi devas pagi unu eŭrocendon pli. Unu eŭrocendo estas malmulte, sed kiam tio okazas ĉe kargo de 1.000 kilogramoj, vi devas pagi 1 000 eŭrocendojn pli ol via intenco. Se vi premas pli frue, vi pagos tro multe. Se vi premas malfrue, eble alia komercisto premis pli frue ol vi. En tiu situacio la aĉetaĵo preteriris vian nazon... Tial ni ekzercos antaŭe. Imagu ke ĉiu kiel komercisto volas aĉeti ion por 80 eŭrocendoj. Tenu vian montrofingron super la butono kaj premu tiel ke la montrilo haltas precize ĉe 80.

Nun ni komencas la veran vendadon. Ni ne vendas po kilogramo, sed ordinaro: unu sakon da pomoj, unu kukumon k.t.p. Rigardu la aŭkciprezmontrilon kiel eŭron: ĉiu strieto estas unu eŭrocendo. Kiam la montrilo montras 20, tio signifas 20 eŭrocendoj. Sed ankaŭ € 1,20 aŭ € 2,20. Tio dependas de la vendotakso kiun la aŭkciisto mencias. Kiam la vendotakso por iu difina produkto estas € 1,50, la montrilo startas ĉe 50 kaj malaltiĝas al € 1,40, € 1,30 k.t.p., ĝis iu haltigas la montrilon ĉe la prezo kiun li volas pagi por tio.

Unu el la helpantinoj alportas la produkton al la 'komercisto' kaj tuj enkasigasi la monon.

Fine de vendado vi povus provi halti ankoraŭfoje la montrilon je 80. Ni serĉu la ‘Superan komerciston’. La vendisto sciigos kiuj komercistoj komencos. Tiuj, kiuj sukcesis haltigi la montrilon je 80, batalos denove inter si por la titolo ‘Supera komercisto’.

Ni esperas ke vi ĝojis kaj ni dankas vin pro via atento. Ni deziras al vi plie agrablan tagon. Volonte ĝis revido!

Esperanto-Nederland afd. Alkmaar.
15-01-2004.